



# Komencanto

## Kiel tio komenciĝis

Rakontas Hori Yasuo,  
vicprezidanto de Japana E-  
Instituto, aŭtoro de famaj  
"Raportoj el Japanio"

## Universala Kongreso en Japanio

Jokohamo - ĉefurbo de UK-92  
Historio de Japana E-movado

## Verkoj de niaj legantoj

Printempaj skizoj; Edelvejsjo  
Romantikaj aligatoroj,  
Poeziaj dediĉoj  
En Londona Parko (originala  
mikronovelo).  
Poemeto "Ĉe cirk".

## Neelpensita historio

La greka knabineto

## Impreso

Mi havas revon

## Gramatiko serioze kaj ŝerce

Kiam ni akiras PIV ni ĉesas esti  
komencantoj  
Poeto-klasikulo E.Miĥalski kaj  
gramatiko

## Humuraj paĝoj

43 historioj pri amo  
Ŝercaj rimarkoj pri rilatoj inter  
viroj kaj virinoj


## La praktiko

Piede el Francio al Mongolio -  
intervjuo kun E-vojaĝanto

## Bonvenon al Japanio!

kanto originala

Kirjakova Olga [Orenburg, Rusio]



*Mi kiel ĉiam rapidis, sed...*

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

2007

januaro-februaro

1 (63)

## Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,  
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910  
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson  
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,  
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia  
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craighenill Road, Carluke, ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1, CZ-696 62 Stržnice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,  
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,  
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando  
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-  
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse,  
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada  
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,  
TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio. Via Villorresi. 38, 20143, Mi-  
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Višnja Brankovič  
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,  
Dublin 6W
- Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,  
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-  
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa  
11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.  
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,  
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,  
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-  
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugalio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,  
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8,  
SE-242 35, Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH —  
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El  
Cerrito, California 94530, U.S.A.

### Karaj legantoj!

La unua numero de nia revuo ĉiu-jare estas tradicie dediĉata al la lando de la vica Universala Kongreso. En 2007 la UK-on gastigas Japanio kaj esperantistojn el la tuta mondo akceptos havena urbo Jokohamo.

Tiu ĉi urbo estas por ni ne nur la kongresurbo. Jokohamo estas tre kara urbo por ni (la red.) persone, ĉar antaŭ jaro kaj duono en Jokohamo pasis la 92-a Japana Esperanto-kongreso, kien ni estis invititaj kiel gastoj kaj ricevis proponon rakonti al la kongresanoj pri "Komencanto". Partopreno en tiu entuziasmiga japana kongreso, varma, kortuŝa akcepto de japanaj gesamideanoj por ĉiam restos en la memoro kiel mirindaj, neforgeseblaj momentoj de la vivo. Al ĉiuj niaj legantoj ni deziras laŭeble peni viziti la 92-an UK-on kaj ĝui belan landon Japanion, ĝian kulturon, homojn, naturon.

Memkompreneble, gasto de nia tradicia rubriko "Kiel tio komenciĝis" ĉi-foje estas japana esperantisto, tre aktiva kaj sendediĉa homo en nia E-movado, s-ro Hori Yasuo. Rimarkindas, ke neniu el jam publikigitaj rakontoj similas al la antaŭaj, kaj tio montras, ke per diversaj vojoj oni venas al Esperanto, kaj motivoj de la veno povas esti malsamaj, sed ĉiuj historioj konvinkas nin en tio, ke Esperanto pozitive ŝanĝas nian vivon, vastigas kaj riĉigas nian mondon.

Krom temo de Japanio en la numero estas respegulata temo de amo, sur paĝoj "Verkoj de niaj legantoj" kaj sur humuraj paĝoj. Ja februare en multaj landoj kaj lokoj estis festata "Valentena Tago" aŭ "Tago de ĉiuj Amantoj". Ni ĝojas, ke krom jam konataj al vi aŭtoroj, kiel M. Zujeva kaj T. Vŝivceva el Rusio, S. E. Bullo el Italio, vi povas konatiĝi kun novaj kontribuantoj. Tiuj estas Angela Tellier el Britio kun sia tradukita versaĵo "Ĉe cirk'" kaj Lenke Lzasz el Rumanio kun la kortuŝa rakonto "La greka knabino". Aida Kiyoshi el Japanio prezentis siajn impresojn pri la evento de 1968, kiam li studis en Usono. Li esperantigis faman prelegon de pastro Martin Luther King "Mi havas revon".

Kiel ĉiam interesaj kaj samtempe utilaj prigramatikaj cerbumadoj de Johan'-Luko Tortel el Francio atendas vin en la gramatika rubriko. Filozofi-gramatika poemo de fama E-poeto E. Miĥalski bele daŭrigas gramatikan materialon.

Por la rubriko "Praktiko" Betty Chatterjee el Danio sendis sian novan kontribuon pri Maxime Rabineau, junulo-esperantisto, kiu eliris el Francio kaj celas piedpaŝe atingi Mongolion.

Sur la lasta paĝo ĉi foje vi trovos amuzan kanton "Bonvenon al Japanio", kiun komponis juna japana esperantistino Tazina Mayuko. Ĝi kronas la japanan temon de la 1-a numero.

Agrablan legadon!

## Komencanto

**2007 numero 1 // (63) regule aperas ekde 1998 redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev kunredaktas Raja Kudrjavceva**  
**adreso:** 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio  
**retpoŝto:** [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)  
**abontarifo por 2007:**

*internacia tarifo:* 18 eŭroj

*orienteŭropa kaj latinamerika tarifo:* 15 eŭroj;

*aerpoŝta aldono* 2 eŭroj


**konto ĉe UEA:** **vkud-a**

*rusia tarifo:* 200 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

*Vaste konata Esperanto-aktivulo el Japanio, vicprezidanto de Japana E-Instituto, estro de la redakta fako de "La Revuo Orienta", aŭtoro de famaj "Raportoj el Japanio"*



*Kiam oni petas de mi subskribi al mia libro iom da vortoj, mi ofte skribas: "Esperanto estas mirinda lingvo, kiu malfermas novan mondon". Vere por mi Esperanto malfermis novan, tre riĉan mondon.*

### Mia mondo vasiĝis

Mi estis instruisto de la angla lingvo. Oni emas pensi, ke instruistoj de la angla estas tre internaciemaj, ĉar la angla estas "internacia". Certe mi estis pli *internaciema* ol aliaj instruistoj, ĉar mi agadis diversloke kiel pacamanto. Mi havis intereson pri internaciaj aferoj, tamen mia kontakto kun la mondo estis ne persona, ne memkontakta, sed perĵurnala. Mi havis preskaŭ neniun amikon en la mondo. Ja mi vizitis kelkajn landojn, kaj okaze de tiuj vojaĝoj mi havis provizorajn amikojn, sed tia "amikeco" aŭ homaj kontaktoj ne daŭris longe, ĉar inter ni mankis komuna temo kaj forta motivo. Krome, mi hontis mian malbonan kapablon de la angla lingvo, do mi ne volis skribi leterojn en la angla. Post unufoja aŭ dufojaj korespondoj nia "amikeco" rompiĝis.

Tamen Esperanto estas tute alia. Kiam mi serioze eklernis Esperanton en la mezo de la 1980-jaroj, mia adresaro tuj pleniĝis per adresoj de eksterlandaj amikoj, ili estis el ĉiuj anguloj de la mondo. En decembro kaj januaro venis al mia hejmo multaj sezonaj bondeziroj kun belaj kartoj kaj poŝtmarkoj. Poste, pro disvastiĝo de interreto eĉ en evoluantaj landoj, mia komputilo estiĝis ĉiutage sata pro alfluantaj mesaĝoj el diversaj lokoj de la mondo.

## Esperanto malfermas novan mondon

Tamen en Esperantujo mi ne nur ricevas leterojn poŝte kaj interrete, sed ankaŭ renkontas tiujn leteramikojn ofte. Ĝenerale estas tre malfacile renkonti eksterlandajn amikojn plurfoje. Kiamaniere ni povas re-renkonti amikojn, kiujn ni renkontis dum nia vojaĝo? Estas preskaŭ neeble denove renkonti, sed en Esperantujo eblas oftaj renkontoj. Okazas multaj renkontiĝoj en la mondo, UK-oj, IJK-oj, landaj kongresoj, internaciaj kursoj, internaciaj renkontiĝoj ktp., kaj tre ofte ni renkontas eksterlandajn amikojn tie. Per korespondado kaj per renkontado, ni povas pli profundigi nian amikecon. Krom Esperantujo nenie estas tia mondo.

Mia Esperanto ŝanĝis ankaŭ mian ĉirkaŭon. Ju pli mi dediĉis min al Esperanto, des pli mi fariĝis bona kaj estimata instruisto, ĉar en miaj klasoj studentoj havis pli grandan mondon, estis pli informitaj pri la mondo, kiun mi spertis mem. Ili rimarkis, ke por lerni la anglan bone, ne sufiĉas lerni vortojn kaj gramatikon, sed necesas pli riĉigi sian karakteron. Ili havis pli vastan intereson pri diversaj aferoj kaj konsideris, kion indas lerni. Ili eksciis la valoron de Esperanto kaj iuj komencis lerni ĝin. Tiele Esperanto ne nur influis mian vivon, sed ankaŭ tiun de miaj studentoj.

### Mia vivo evoluis

Granda ŝanco kaj ŝanĝo en mia Esperanto-vivo okazis kiam mi hazarde renkontis s-ron Paul Signoret el Francujo. Tiam li estis redaktoro de "Sennaciulo" (oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda) kaj li ie skribis, ke mankas al lia gazeto raportoj el Azio, kaj mi komencis sendi al li miajn raportojn. Iun tagon mi surprize trovis mian raporton en la gazeto. Tio estis mia debuto kiel esperantista verkisto. Poste mi sendadis

raportojn al MONATO, internacia sendependa gazeto, kaj miaj raportoj ofte aperis en ĝi. Mi havis pli kaj pli da memfido pri mia kapablo verki. En 1997 mi vizitis Francujon por renkontiĝi kun s-ro Signoret kaj tiam li rekomendis, ke mi eldonu mian libron "Raportoj el Japanio" kun la promeso helpi min pri korektado de la materialo. Kaj en 1998 mia unua libro "Raportoj el Japanio" eldoniĝis. Kontraŭ mia antaŭjuĝo, ĝi relative bone vendiĝis, tial ke la eldonisto s-ino Syozi Keiko, ankaŭ esperantistino, decidis pri la daŭra eldono.

Mi estis verkema homo kaj ofte skribis eseojn en la japana lingvo. Mi jam verkis kaj eldonis kelkajn librojn en la japana lingvo, sed mi neniam imagis, ke mi verkos librojn legatajn tra la tuta mondo. Dank' al Esperanto mi nun estas verkisto kaj mi verkis kaj eldonis 10 librojn en la serio "Raportoj el Japanio", po unu libro sinsekve dum la pasintaj 10 jaroj. Tio estas la rezulto de mia seninterrompa skribado de raportoj, kaj eble mi skribos pri Japanio ĝis mia morto. Mi esperas, ke tiu serio estos tre unika enciklopedieto kaj historia verko pri Japanio en la komenco de la 21a jarcento.

### Mia renkontiĝo kun Esperanto

Mia patro estis esperantisto. Li estis profesoro de biologio kaj simple scivolema homo. Kiam d-ro Nisi Seiho, poste prezidanto de Japana Esperanto-Instituto, venis al lia universitato kiel rektoro fine de la 1940aj jaroj kaj organizis Esperanto-klubon, la patro partoprenis en ĝi kaj pli kaj pli fervoris en Esperanto. Li havis leteramikon en Norvegujo, kiu iun tagon sendis al li semojn de kreskaĵo *Cobaea scandens*. Interŝanĝe mia patro sendis semojn de "farbeto" (*Pharbitis Nil*) al li.

>>>

Mia patro zorge vartis la plantojn kaj en somero ili havis belajn violkolorajn flo-rojn. Ambaŭ plantoj havis volvotigojn. Mia patro skribis en sia eseo: "Niaj koroj estas nun tiamaniere firme kunligitaj per sama planta volvotigo". Tiu sperto de mia infaneco tre multe influis min. Estas nature, ke mi lernis Esperanton en postaj jaroj.

Tamen por vere veni al Esperanto mi bezonis multajn jarojn. Ja mi lernis Esperanton, kiam mi estis universitata studento kaj poste mi organizis Esperanto-klubon en mia lernejo, sed mia scivolemo pri aliaj lingvoj malhelpis min tuj pliproksimiĝi al Esperanto. Mi vagadis inter la angla, la germana, la sanskrita, la ĉina, la indonezia, la rusa ktp. kaj fine en miaj 40-jaroj mi venis al Esperanto. Iun tagon mi subite rimarkis, ke tiamaniera vagado inter lingvoj estas tute senutila kaj estas perdo de mia valora tempo. Mi haltis iom da tempo kaj cerbumis pri tio, kion mi faru, kaj mi faris la konkludon reveni al Esperanto, ĉar nur ĝi kontentigos miajn du interesojn: pacon kaj lingvon. Mi decidis serioze lerni Esperanton kaj mi devigis al mi tri aferojn: legi ĉiun tagon tri paĝojn en Esperanto, ĉiun monaton skribi du eseojn pri Japanio kaj partopreni en esperantistaj eventoj laŭeble. Jam dum 20 jaroj mi plenumadas tiun mempromeson kaj la rezulto ĉe tiu plenumado estas mi nuna. Esperanto tiamaniere ŝanĝis kaj riĉigis mian vivon.

### Feliĉo kun Esperanto

Nun en Japanio abundas maljunuloj. Multaj ĝuas sian vivon kun sano kaj mono. Multaj vojaĝas eksterlanden, tamen al mi ŝajnas, ke ili nur elspezas siajn monon kaj vivon nur por sia ĝojo, sed aldonas nenion al la socio. Ili spertis militon kaj postajn malfacilaĵojn, do ili devus labori por paco kaj por la socio, sed bedaŭrinde ili ne havas rimedon por tio. Tamen esperantistoj havas. Ĉiun tagon ni fortigas amikecon inter homoj, ĉiun tagon ni laboras por paco, dediĉante sin al Esperanto.

Feliĉe nun mi havas sufiĉe da mono por vivi, vojaĝi kaj renkontiĝi kun esperantistoj. Feliĉe nun mi havas sanon dank' al "Hietori-terapio" (subkorpa baniĝo kaj piedvarmigado). Feliĉe mi havas Esperanton dank' al d-ro Zamenhof, mia patro, s-ro Signoret kaj aliaj multaj sindonaj esperantistoj. Ĝis mia morto mi vivos kun Esperanto por ke amo, amikeco, justeco, paco kaj ĉio bona disvastiĝu en la tuta mondo. Dank' al Esperanto mia vivo estas benata.

*Karaj legantoj! Ĉi-sube vi povas iom legi pri la urbo de ĉi-jara UK.*

## Jokohamo ĉefurbo de la 92-a UK

### Geografio

Jokohamo situas sur la duoninsulo Miura, fronte al la Golfo de Tokio kaj 30 km sudokcidente de Tokio. La nomo de Jokohamo signifas origine larĝan strandon. La areo estas 435 km<sup>2</sup> vasta kaj la loĝantoj en 1 km<sup>2</sup> estas 8170 (en la jaro 2004). Jokohamon limigas okcidente la rivero Sakai kaj norde la rivero Hajabuĉi kiu estas la forko de la rivero Curumi. Plejmulto de la urbo estas sur milda deklivo, kiu etendiĝas ĝis la montetaro Tama. Ne ekzistas grandaj montoj en la urba regiono.

### Ĝenerale

Jokohamo kuŝas ĉe la okcidenta flanko de la Golfo de Tokio. Ĝi estas la dua plej granda urbo kun loĝantaro de ĉ. 3.4 milionoj. Jokohamo estas la registara sidejo de la gubernio Kanagawa kaj ĉefa orienta enirejo al Japanio.

La haveno estis malfermita por eksterlanda komerco en 1859. En la erao Edo (1603 – 1868) dum ĉ. 250 jaroj Japanio fermis sin kontraŭ eksterlando escepte de Ĉinio kaj Nederlando. Siatempe Jokohamo estis kvieta kaj malgranda fiŝvilaĝo proksime de Tookaidoo, la ĉefvojo inter Edo (nuna Tokio) kaj Kioto.

Ekde la malfermiĝo de la haveno, Jokohamo fariĝis ĉefa pordo de Japanio ĝis la Dua Mondmilito. Tra ĝi multe da okcidentaj kultuirajoj envenis en Japanion.

Ankaŭ okcidentaj aĵoj enfluis kun la alveno de alilandaj armeanoj kaj komercistoj, kaj tial en Jokohamo troviĝas monumentoj, konstruaĵoj kaj produktaj el Okcidento, ekz. fervojo, glaciaĵo, biero, ŝinko ktp kiel la unuaj en Japanio.

En la erao Meiji (1868-1912) Jokohamo disvolviĝis kiel urbo de internacia komerco kaj industrio. En la unua periodo la internacia komerco estis ĉefe per silko. Pro tio oni konstruis ŝpinfabrikejojn kaj teksejojn en najbareco. Ekfunkciis sinsekve diversaj industriaj fabrikoj por ŝipoj, elektro-maŝinoj ktp. Poste en la erao Taiŝoo (1912-1926) kaj Ŝooŭa (1926-1989) la poldera tereno laŭ la marbordo pli kaj pli grandiĝis kaj fariĝis unu el grandegaj industriaj zonoj en Japanio. Pro la Granda Terremo (1923) kaj la Dua Mondmilito, du fojojn Jokohamo tute detruigis, sed poste releviĝis. Post la milito usona armeo okupis ĉefajn partojn de la urbo.

Ĝis la 60aj jaroj usona militbazo lokis sin proksime de la urbocentro. Pro tio la renoviĝo malfruigis.

De 1989 la nova kvartalo MM21 estas konstruata en la marborda zono proksime de la stacio de Jokohamo. Tie troviĝas la plej alta konstruaĵo de Japanio, Simbola Turo, la internacia kongresejo Pacifiko-Jokohamo, Artmuzeo-Jokohamo, amuzejo, koncerto-halo, hoteloj kaj diversaj vendejoj kaj restoracioj. Unuvorte la kvartalo funkcias kiel tre aktiva kaj supermoderna zono.

Kongresanoj povos ĝui ne nur konstruaĵojn kaj kulturaĵojn hereditajn de la 19a kaj la 20a jarcentoj, sed ankaŭ supermodernajn de la 21a jarcento.



la kongresejo hotelo-palaco "Velo"

# Historio de Japana Esperanto-movado

## 1. La mirinda jaro 1906

En 1906 Hutabatei Simei, konata verkisto, eldonis la lernolibron de Esperanto *Sekai-go* (Monda Lingvo). Lia lernolibro tiel bone vendiĝis, ke multaj homoj eklernis Esperanton kaj el tiuj homoj estiĝis aktivaj esperantistoj.

En 1906 George Edward Gauntlett, anglalingva instruisto en Okayama, kiu hazarde enmanigis Esperanto-lernolibron verkitan de O'Connor, komencis korespondan kurson de Esperanto kaj la nombro de la lernantoj atingis 667.

Kroita Kacumi, doktoro pri historio, ekkoninte Esperanton pere de la artikolo en *Nagasaki Press* skribita de A. Mistler kaj komencinte lerni Esperanton, skribis artikolon pri Esperanto en majo 1906 en la ĵurnalo *Yomiuri*. Dank' al tiu artikolo al li kolektiĝis informoj pri Esperanto. Surbaze de la nom-listo de la koresponda kurso de Gauntlett, li kaj aliaj du esperantistoj laŭ sia iniciato fondis Japanan Esperanto-Asocion la 12-an de junio 1906 en Tokio, kaj en septembro okazis la unua Japana Esperanto-kongreso (JK).

Estas mirinde, ke en 1906 unua lernolibro eldoniĝis, unua koresponda kurso komenciĝis, la tutjapana Esperanto-asocio fondiĝis kaj la unua JK okazis... Vere en 1906 la japana organizita Esperanto-movado komenciĝis.

## 2. Fondiĝo de Japana Esperanto-Instituto (JEI)

En la sekva jaro 1907 okazis la dua JK, sed poste sekvis la movada stagnado, tiel ke la 3-a JK okazis en 1916. Tamen de tiam JK seninterrompe okazadas ĝis nun krom en 1944 dum la Dua Mondmilito (Pacifika milito).

En 1919 la asocio ne povis funkcii bone, kaj la fondo de tute nova organizo estiĝis nepre necesa. Fine de la jaro fondiĝis Japana Esperanto-Instituto (JEI). La unua numero de ĝia organo *La Revuo*

*Orienta* eldoniĝis en januaro 1920, kaj ĝi atingis la numeron 1028 en januaro 2007.

La movado rimarkinde progresis. La nombro de la JEI-membroj kreskis: 720 en 1921, 1004 en 1922 kaj 2440 en 1923. La movado disvastiĝis al diversaj regionoj.

## 3. De la 1930-aj jaroj ĝis 1945

Sekve de la milito kontraŭ Ĉinio en 1931, Japanio forlasis Ligon de Nacioj en 1933. Enlande regis militarismo, kaj finfine Japanio komencis militi kontraŭ Usono en 1941. Sub tiu situacio iuj esperantistoj decidis labori laŭ la agresa politiko de la registaro. JEI nek sekvis tiun vojon, nek kontraŭstaris. Plejmulte da esperantistoj povis fari nenion krom protekti Esperanton. La viva situacio pli kaj pli malboniĝis. En 1944 oni timis aeratakojn fare de Usono. Finfine en la marta numero de *La Revuo Orienta* aperis anonco ke ĝi ĉesos eldoni ĝis la fino de la milito. La milito finiĝis la 15-an de aŭgusto 1945. La oficejo de JEI feliĉe restis nedifektita.

## 4. Postmilitaj jaroj

JEI tuj komencis restarigi la movadon. Ĝi sendis enketleterojn al 646 membroj, el kiuj revenis 200 respondoj. En oktobro 1945 *La Revuo Orienta* estis reeldonita kvankam nur kun 8 paĝoj. Ĝis la fino de la jaro komenciĝis kursoj kaj kunsidoj en diversaj lokoj. La 32a JK okazis kun la partopreno de 72 membroj en decembro 1945 en JEI-oficejo.

En 1956 Japanio ekonomie ekprosperis. En decembro al Japanio estis permesita membriĝi al Unuiĝintaj Nacioj. En tiu jaro JEI estis aprobita por membriĝi al UEA, kaj la japana Esperanto-movado 50-jariĝis. Por festi la jubileon, oni okazigis la 43an JK en Tokio en novembro. Tio estis granda sukceso, aliĝis 757 esperantistoj.

En la 47a JK en 1960 oni decidis inviti la 50an Universalan Kongreson (UK). Post 5-jara preparado ĝi okazis en aŭgusto 1965 en Tokio. La nombro de aliĝintoj estis 1710 el 46 landoj. Post la UK okazis Internacia junulara Kongreso en Ootū en Kansaja Regiono. En ĝi partoprenis 45 eksterlandanoj kaj 174 japanoj.

## 5. Post la UK ĝis hodiaŭ

En aŭgusto 1969 forpasis Osaka Kenji, kiu estis motoro de la japana Esperanto-movado de la fondo de JEI. Ĝia ĝenerala sekretario Muake Ŝihej eksigiĝis en 1971. En la japana Esperanto-movado aperis nova ondo kun novaj aktivuloj. Dum tiuj jaroj JEI kaj Kansaja Ligo de Esperanto-grupoj (gvidata de Miyamoto Masao) ludis gravan rolon respektive en la orienta kaj okcidenta partoj de Japanio.

Aliaj menciindaj aferoj estas eldonoj de du vortaroj, nome *Vortaro Japana-Esperanta* (1983) kaj nova *Esperanto-Japana Vortaro* (2006).

De la 90aj jaroj, dank'al la forta japana ekonomio, japanoj multe partoprenas en UK-oj. En Azio, pro la politika stabiliĝo kaj la ekonomia progreso, estiĝis kondiĉoj progresigi Esperanto-movadon, ne izolitan sed kunlaboran. En 1991 la organo *Esperanto en Azio* ekaperis, en 1994 Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-movado fondiĝis kaj en 1996 la unua Azia Kongreso okazis. En tia situacio kaj en la epoko de interreto la japana esperantistaro ekhavis pli vastan perspektivon kaj pli grandan respondecon pri Esperanto-movado ne nur en Japanio sed ankaŭ en la mondo. Profitante la okazon de la 92a UK en Jokohamo, la japana Esperanto-movado espereble pli forte, pli konstante antaŭeniros.

(redakta fako)

el *La Revuo Orienta* 1 januaro 2007 (1028)

*Februare en multaj landoj kaj lokoj estas festata "Valentena Tago" aŭ "Tago de Ĉiuj Amantoj".  
Lige kun tio ni aperigas tiujn ĉi kontribuojn de niaj legantoj*

Margarita Zujeva [Moskvo, Rusio]

## Edelvejso

En antaŭaj tempoj pro belegaj sinjorinoj oni batalis kontraŭ monstroj, rivalis en kavaliraj turniroj kaj efektivigis alian ilian gloradon.

En Svisio al siaj amatinoj oni donacis montan edelvejson – fajnan floron, signon de senfina amo.

Edelvejsoj (latina nomo *leontopodium alpinum*) kreskas sur vertikalaj rokoj en Alpaj montoj. Deekstere la floro iomete similas leonan piedon. Ekstravaganca supra parto de ĝia trunketo konsistas el korbetoj, torditaj per kompakta flavetaj buletoj kaj el kreskantaj en formo de stelo lakta-blankaj petaloj. Ĉi tiu floro estas talismano.

Niatempe legenda edelvejso iĝis neoficiala, sed la plej ĉarma simbolo de Svisio.


Alpaj loĝantoj plezure kultivas ĉi tiujn florojn en oranĝerioj, ornamas per ili domojn kaj vendas edelvejsojn al turistoj.

Esperantigis **Raja Kudrjavceva** [Jekaterinburg, Rusio]

## Romantikaj aligatoroj

Februaro estas la plej romantika monato ankaŭ en Florido, Usono. Vir-aligatoroj komencas plenumi serenadojn al siaj inoj. La vibrado, kiun ili okazigas en akvo estas tiom forta, ke transdoniĝas per la akvo al grandaj distancoj.

La kanto tiom ĉarmas aligatorinon, ke ŝi komencas serĉi la plenumanton de la serenado. La paro kuniĝas en ama ekstazo kaj ili longe ne lasas unu la alian.



Všivceva Tatjana [Miass, Rusio]

## Dediĉoj

*Por la Tago de Amantoj mi proponas jenajn dediĉojn, kiujn oni povas legi kvazaŭ sinturnojn al siaj amatoj.*

Al...

Flam' de mia anim'  
ajnan viron provokas je am'.  
Vidu, arde min ami  
ne povas verŝajne nur ci.  
Via fajro glacia kun mia anima ekflam'  
Tute ne koincidas.  
Sed kial min logas glaci'?

Al...

Oni diras - la kor' estas ŝtona,  
Kvankam scias - ĝi brulas en flam'  
Ĉu en vi ĝermis amo burĝona?  
Aŭ nur flirton vi celis sen am'?

Al...

Ne tristu pro disiĝo, kara mia.  
Ni amu dum centjaro aŭ eĉ pli -  
La amo estas sonĝo, letargio.  
Vekiĝos tutegale iam ni.

Al...

Mi renkontos lin hazarde sur strat',  
Kaj eksplodos io en la anim'  
Pro l' mistera bluokula rigard',  
Promesanta ŝajne amon sen lim'.  
Sed denove kaptos ĉiutagec' -  
La aferoj, zorgoj pri famili',  
Nur en pensoj fulmos ia maldec',  
Ĉar la cerbon regos pensoj pri li.

Santi Elena Bullo [Mestre, Italio]

## En Londona parko

*mikronovelo originale verkita*

Estis bela vintra mateno kaj John Koster fine povis ĝoji pro libera festtago.

La fratino Mara kun la edzo kaj la gefiloj iris al la parka naĝejo kie la knabinoj partoprenis en la konkursoj por naĝantoj. John preferis promeni laŭ la aleoj kaj la padoj inter verdaj arbetoj.

Li ne vidis aliajn personojn najbare: la familianoj kaj la amikoj ĉeestis en la naĝejo. John post longa promeno revenis al la sama loko. Atendante la venon de la naĝantoj, li ek-sidis sur benketon...

Aŭskultante ĉarman kanton de malgranda birdo, li fermis plezure la okulojn.

Sed tuj li malfermis ilin: iu estis najbare al lia genuo.

Apud si li ekvidis la muzelon de ursido, kiu lin rigardis atente. John ne estis viro timanta, sed vere li ne sciis kion fari. Eble la ursido estis malsata?

Malrapide John prenis el sia saketo la biskvitojn, aĉetitajn por la nevoj. Tre plezure la besto manĝis la frandaĵon, poste ĝi remetis sian simpatian muzelon apud la ulo... John jam per telefoneto vokis la polican serĝenton Gallup, kiu rapide alvenis.


La serĝento opiniis, ke la ursido forkuris el sia kaĝo, de la strata cirko, kiu lokiĝis en la parka placeto. Li sendis alian policanon al la cirko por kontroli.

Jam komencis alveni aliaj homoj, kiuj scivoleme grupiĝis por rigardi la scenon. Bonŝance fine la sendita policano revenis kune kun cirkaj servistoj.

Ili prenis la ursidon per la kolringo kaj tiu kviete ilin sekvis. Antaŭ malaperi en la aleo, la ursido turnis la kapon. Kune kun febla voĉo li sendis la lastan rigardon al John. Kaj John surprize kaj emocie mansignis, salutante...

Dume la naĝaj konkursoj finiĝis kaj la spektantaro malrapide eliris el la naĝejo. John, iom pensiginte, sekvis okule la ursidon.

Mestre, 23.02.2006



Desegnis  
Viv O'Dunne

Gellu Naum

La poemon esperantigis  
Angela Tellier [Felixstowe, Suffolk, Britio]

## Ĉe cirk'

Ĉe cirk' en placo de Luksor'  
Sur la glacio de l' dekor'  
Vivis kaj ridis kun kantor'  
Eta pingven' el Labrador'.  
Nomiĝis li Apolodor'.  
Kaj faris jen: kantis en ĥor'.  
Do, li ne estas trobador',  
Nek akrobat', nek orator';  
Li faris jenon kun fervor':  
Kantis en ĥor'. Estis tenor'.  
Diketa, neta la sinjor',  
En frako brila de senjor'—  
Tia estis Apolodor'

En unu tag' Apolodor'  
Deklaris je ĉies horor':  
Mi sopiregas kun dolor'  
Je mia klan' en Labrador'!

\*\*\*

Lenke Lzasz [Praid, Rumanio]


## La greka knabineto

Mia frato jam estis dek-jara, kiam mi naskiĝis.

Mi ne memoras, ĉu iam ni ludis kune. Li estis knabo, kaj knaboj ne ludas kun knabinoj, precipe ne kun etulinoj. Kiam mi fariĝis kvinjara, li eklernis en urba gimnazio, poste li devis militservi. Ni fakte ne havis komunan infanecon. Ĉiam mi estis sola. Miaj gepatroj laboris, kaj mi devis elpensi ludojn por mi mem, por ne enuiĝi. Antaŭ ol iri en lernejon, mi jam sciis skribi "preslitere". Mi memoras, ke foje mi skribis "gazeton" sur kvar paĝoj de la lerneja kajo. Pri la enhavo mi ne havas memoron, nur pri la plezuro, ke mi "faras gazeton". Diligente mi laboradis sola en la silentaj horoj de posttagmezo, patro kaj patrino laboradis.

Alia kara memoro estas, ke la avino laŭtleĝis por mi partojn el siaj ŝatataj legaĵoj, kiam mi vizitis ŝin dimanĉe posttagmeze, kun permeso de la patrino.

Poste mi mem iĝis pasia legantino. Tiutempe en mia naskiĝvilaĝo ne estis ankoraŭ elektro. Mi legis ĝis plena vesperigo ĉe fenestro.



Voroncova Nadejda [Kurgan, Rusio]

Kiam la patrino ekvidis min leganta vintre ĉe la flamoj de la forno, kies pordeton mi lasis malfermita por havi lumon, ŝi riproĉis min pro tio, ke mi difektos miajn okulojn legante en mallumo.

Baldaŭ mi komencis skribi, fari ĵurnalon, verki fabelojn. Neniu legis miajn skribaĵojn, mi skribis por mia plezuro.

Ja ĉiam estis mi sola. Mi eĉ kunludantojn ne havis, ĉar ankaŭ la najbarinoj ne havis infanojn.

Foje mi aŭdis diskuton de miaj gepatroj. Ili aŭdis, ke oni venigos en nian vilaĝon grekajn infanojn, kaj familioj devos akcepti kaj kreskigi ilin. Tiutempe, dum la postmilitaj jaroj, la vilaĝanoj ne havis facilan vivon. Okazis ankaŭ ŝanĝo de reĝimo, la kamparanoj estis devigitaj mebrigi en kolhozo kaj rezigni pri propra terpeco. Tiuj, kiuj provis rezisti, suferis persekutadon, iuj eĉ mortis pro la kruela bato de la sekurpolicianoj. Kreskigi ankaŭ fremdan infanon, nun mi komprenas, ne estis feliĉa perspektivo por miaj gepatroj. Sed mi, mi ekĝojis! Venos eble greka knabineto, kaj mi havos, kun kiu ludi, mi havos fratinojn. Tiutempe mi eĉ ne pripensadis, kial greka infano ne restas en Grekio kune kun siaj gepatroj, nenion mi sciis pri la tiutempaj politikaj eventoj okazintaj en Grekio. Mi atendis la grekan knabinon. Mi eĉ ne imagis, ke greka knabino parolos nekonatan por mi lingvon. Ja ĉiuj homoj en mia vilaĝo parolis hungare, mi ne aŭdis alian lingvon, eĉ ne sciis, ke tiuj ekzistas. Se pluvis en nia vilaĝo, mi imagis, ke samtempe pluvas ĉie, ja mia tuta mondo limiĝis je mia vilaĝo.

Mi atendis la grekan knabinon.

Se okazis, tre malofte, ke aŭtomobilo ekaperis en la vilaĝo, mia koro ekbatis pli rapide: eble nun venas la greka knabineto! Ŝi ne alvenis.

Sed eble ŝi venos per la trajno. Sed ankaŭ per trajne ŝi ne venis. Neniu greka infano venis en nian vilaĝon. Kaj mi restis sola, sen fratino.

Eĉ nun mi atendas... la grekan knabinon.

Aida Kiyoshi [Jokohamo, Japanio]

## El miaj epizodoj dum mia vivo en Usono

Kiam mi kun mia edzino loĝis en Usono (1966~1968) kiel stipendiulo de postdiploma kurso en Oregon State Universitato, okazis ŝoka afero. La 4-an de aprilo 1968 pastro d-ro Martin Luther King estis mortigita sur la balkono de la Lorraine motelo en Memfiso, Tenesio. Eĉ nun mi freŝe memoras la okazintaĵon. Tiam mi kaj mia edzino restis en San-Francisko unu semajnon. Tiu tagon mi partoprenis en la ĝenerala kunveno de Usona Kemia Asocio por raporti mian disertataĵon. En la mateno de la 5-a ni atendis la alvenon de s-ro Miko, nia amiko en San-Francisko, kiu veturigos nin al vidindaj lokoj en Kalifornio. Li estus devinta veni al nia hotelo je la 10-a horo matene. Li malfrue venis, dirante: "Mi malfruiĝis, ĉar la televida programo pri d-ro King kaptis min ĝis malfrua nokto hieraŭ". Ankoraŭ li diris: "Mi estas tre malĝoja, ĉar d-ro King estis respektinda homo." Ankaŭ ni vidis la saman programon kun granda ŝoko. En ĉi tiu programo la raportisto larmeme protestis: "Kiel profunde malsaniĝis usona socio? Vi hontu, Usono!"

Multaj japanoj konas lian nomon, ĉar ili lernas en mezlerneja angla lernolibro lian tre faman paroladon titolitan "Mi havas revon". Ĝi estis dirita antaŭ la Monumento de Lincoln dum la 1963-a, okaze de Marŝado al Vaŝingtono "Por Laboroj kaj Libereco".

Martin Luther King naskiĝis en la 15-a de januaro, 1929 kaj mortis en la 4-a de aprilo, 1968. Li estis Nobel-premiito pri la paco (1964), baptisma pastro kaj usona aktivulo devena de Afriko en la kampo de civitanaj rajtoj.

Mi prove tradukis la faman paroladon "Mi havas revon" esperanten el la angla teksto.

Martin Luther King parolis ĝin beltone, kvazaŭ legis poemon:



Martin Luter King

## Mi havas revon

Aŭgusto 28, 1963

esperantigis Aida Kiyoshi [Jokohamo, Japanio]

Mi havas revon, ke nia lando iam leviĝos kaj plenumos la veran signifon de nia kredo: "Ni kredas tiun veron memklara, ke ĉiuj homoj estas kreitaj egale."

Mi havas revon, ke iam sur la ruĝaj montetoj de Georgio, la gefiloj de antaŭaj sklavoj kaj la gefiloj de antaŭaj sklavposedintoj kune sidiĝos ĉe la tablo de frateco.

Mi havas revon, ke eĉ la Ŝtato de Misisipo, ŝtato ŝvita pro varmego de maljusteco, ŝtato ŝvita pro varmego de opreso iam transformiĝos al oazo de libereco kaj justeco.

Mi havas revon, ke miaj kvar infanoj iam vivos en lando, kie ili ne estos juĝataj per koloro de siaj haŭtoj, sed per siaj karakteroj.

Mi havas revon hodiaŭ !

Mi havas revon, ke iam en Alabamo, suferanta pro malvirtaj rasistoj, kaj pro ŝtatestro parolanta nur la vortojn de interveno kaj neniigo el sia buŝo, kaj ĝuste en tiu Alabamo nigraj infanoj iam povos kuniĝi man'-en-mane kun blankaj infanoj kiel fratoj.

Mi havas revon hodiaŭ !

Mi havas revon, ke "ĉiu valo leviĝu, kaj ĉiu monteto kaj monto malaltiĝu, kaj la malebenaĵo fariĝu ebenaĵo, kaj malrektaj vojoj fariĝu rektaj, kaj la montaro fariĝu valo. Kaj tiam aperos la Eternulo kaj ĉiuj homoj kune vidos la Eternulon."

Tio estas nia espero.

Tio estas la kredo, kun kiu mi revenos al la sudo.

Kune kun tiu kredo ni povos tajli la monton de malespero por fari ŝtonon de espero.

Kune kun tiu kredo ni povos transformi la malakordon de nia lando en belan simfonion de frateco.

Kune kun tiu kredo ni povos kunlabori, preĝi kune, lukti kune, iri malliberejon kune, kaj stari kune por libereco kredante, ke ni iam liberiĝos!

Tio estos la tago...

Tio estos la tago kiam ĉiuj infanoj de la Eternulo povos kanti kun nova signifo:

"Mia lando, kiu estas ankaŭ la Via, estas agrabla lando de libereco, por Vi mi kantas.

Lando, kie miaj prapatroj mortis, lando de fieraj pilgrimantoj,  
El ĉiu montoflanko, lasu liberon sonori !"

Kaj se Usono celos grandan landon, ni devos plenumi la je-non:

Kaj do, lasu liberon sonori de la suproj de monstraj montetoj de Nov-Hampŝiro.

Lasu liberon sonori de la elstaraj montoj de Nov-jorko.

Lasu liberon sonori de la Aleganoj de Pensilvanio.

Lasu liberon sonori de la neĝkovrita Rok-montaro de Kolorado.

Lasu liberon sonori de la kurboplenaj deklivoj de Kalifornio.

Sed ne nur tio, kaj ankaŭ:

Lasu liberon sonori de Ŝtona Monto de Georgio.

Lasu liberon sonori de Altana Monto de Tenesio.

Lasu liberon sonori de ĉiu monteto kaj ĉiu talpejo de Misisipo.

El ĉiu montoflanko, lasu liberon sonori.

Kaj kiam tio okazos, kiam ni allasos liberon sonori, kiam ni lasos ĝin sonori el ĉiu vilaĝo kaj ĉiu vilaĝeto, el ĉiu ŝtato kaj ĉiu urbo, ni povos akceli alvenon de tiu tago kiam ĉiuj infanoj de Dio, nigraj homoj kaj blankaj homoj, judoj kaj ne-judoj, protestantoj kaj katolikoj, povos kuniĝi man'-en-mane kaj kanti la malnovan spiritkanton en la teksto de Negro:

"Libera finfine! Libera finfine !

Dank' al Dio Ĉiopova, ni estas liberaj finfine!"


Ĉe Lincoln Memoriga Halo, Distrikto de Kolumbio.



*Esperable vin, karaj legantoj, ĝojigos daŭrigo de la serio de originalaj lecionoj de J-L Tortel. Bonvolu ĝui la vican lecionon!*

Johan'-Luko Tortel [Le Belvedere, Francio]

## Kiam ni akiras PIV, ni ĉesas esti komencantoj



Saluton, karaj gekomencantoj !

Lastan fojon ni lernis du vortojn el PIV: **denotacio** (el-latine: de-notado, = tio el noto, do la rekta klarigo, la senco mem) kaj **konotacio** (el-latine: kun-notado, do la kroma senco, la senco akompan-anta la signifon).

Sed kio estas PIV? - Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (ilustr-ita = kun bildoj: tre interese pri bestoj, plantoj, ktp). Ĝi estas la "Biblio" de seriozaj esperantistoj. Ekzistas tre multaj vortaroj de naciaj lingvoj al Esperanto, kaj inverse. Sed PIV estas tute en Esperanto. Unua-vide tio ŝajnas ne-utila. Kial serĉi klar-ig-on de Esperanta vorto en Esperanto mem, se ni havas la signifon rekte en nia denaska lingvo? Jen kelkaj respondoj.

Komence, la vortoj neniam plene respondas unu al la alia en mal-samaj lingvoj: ekzemple, la Esperanta himno "La Espero" en-tenas la diron: *facila vento*. Nu, en la Franca lingvo, simila vorto facile ekzistas kun du sencoj: 1° senpene farebla; 2° malserioza (facila literaturo, facila virino); do *facila vento* ne havus sencon por Franco se li konsiderus nur tiujn du sencojn. Sed PIV indikas, ke en Esperanto *facila* ankaŭ havas la sencon: *rapide kaj libere iranta, senpene moviĝanta* (kiel en la Rusa); do kvankam ĉiuj Esperantaj > Francaj vortaroj tradukas Francan *facila* nur per *facile*, ni devos traduki: *facila vento* per: *favora vento* (*vent favorable, kaj ne vent facile!*).

Inverse, la Franca vorto **piece** havas amason da signifoj: *peco, ero* (de vesto, de ŝakludo, de mono, de ŝtofo, de blazono, de ĉarpento, de studota kadavro, de maŝino, ktp); *dokumento; kanono; mortigita predo de ĉasisto aŭ de fiŝisto; lageto; vinbarelo; kampeto; ĉambro; flikaĵo; muzikaĵo...* ni certe forgesis kelkajn! Do la traduko de **piece** per *peco* estus tute ne sufiĉa.

En la Itala, ŝajne simpla vorto kiel *bottega* (butiko) povas mal-ofte signifi: *ejo por grupo da kun-labor-antaj artistoj*. Tiaj ekzemploj svarmas en ĉiuj lingvoj. Do ni pli bone fidu je tut-esperanta vortaro.

Poste, pli subtila sed ankaŭ grava estas la helpo de PIV en don-ado de sinonimoj (sinonimo = alia vorto por pli-malpli sama ideo). Je kio tio utilas? Je multo: ekzemple en verk-ado de kanzono aŭ poemo, por esplori pri alia ebla rimo: oni povas ŝanĝi gazono al razeno por rimi kun kuseno anstataŭ plumono; aŭ ankaŭ por eviti tro longan vorton, ekz. *rimorso* por *konscienc-riproĉo*.

Se oni devas plurfoje uzi saman vorton, povas esti stile pli elegante preni alian, ekzemple: *sentenco, popol-diro, aforismo, maksimumo...* por *proverbo*.

Sed la plej interesa kaj tuj oportuna uzo de sinonimoj (sam-sencaj nom-igoj) kuŝas en la eltrovo de vortoj. Ĉu Esperanto havas vorton por nomi la pajlajn tigojn de greno rest-antaj post rikolta falĉ-ado? Ni serĉu: *pajlo*, en PIV, kaj tie indik-ilo resendas nin al kulmo kaj stoplo; jen ni trovis.

Krome PIV estas tre bona gramatiketo! Ni ekzemple legu ĝian artikolon: *\*-a* (artikolo vortara = vort-ar-ero); ni tiam ricevas bonegan priskribon de tio, kion oni nomas adjektivo (aŭ a-vorto).

Multajn aliajn interesajn en-tenas tiu mirinda libro, kiu jam havis tri el-donojn (1969, 2002, 2005). Ĝi fakte aperis en 1930, sen bildoj, kun la nomo **PV**, Plena Vortaro, el la plumo de Grosjean-Maupin, gramatik-isto, laŭ instigo de Lanti, lum-turo de SAT (Sennacia Asocio Tutmonda), labor-ista esperantista asocio, kiu ĝis nun plu-eldonas ĝin. Waringhien, la plej fama esperantisto post Zamenhof, verkis la eldonon de 1969, kaj Duc-Goninaz de 2002 kaj 2005 (legu ĉion eblan de Waringhien kaj de Duc-Goninaz). Nepre hav-enda libro por esperantisto, tiu PIV; ni pasas ŝtupon, kiam ni akiras ĝin: ni ĉesas esti komencantoj! Tamen multajn kritikojn ĝi ricevis, ricevas kaj plu ricevos; nu, PIV ankaŭ entenas multe da proverboj el "La Proverbaro", kaj ĝuste ĉe kritiki, kvazaŭ antaŭ-responde al ĝiaj kritikantoj, ni trovas:

**Kritiki estas facile, fari malfacile;**

aŭ:

**Eĉ kontraŭ pastra prediko troviĝas kritiko.**

Ja PIV estas iom kosta; sed en tempo de donacoj ni eble povas peti PIV por ni !

Ĝis venonta fojo; ni fartu bone, kaj per-PIV-e ek-vidu la ebl-econ ĉesi esti komencantoj !

Johan'-Luko

Eŭgeno Miĥalski

## Enkonduko el "Prologo"

Al Vi, nekaptebla "os",  
neniam kaj ĉiam as'anta,  
mi sendas poemojn de pensoj-ĥaos'  
el mia menso serĉanta.

"Is", "As", "Os" -  
tri elementoj de Tuto -  
finito, vivato, ĥaos', -  
problemo de Absoluto.

Triunuo de hom-superstiĉ',  
triunu' de profeta humano,  
Vi tra vivo miljaris fetiĉ',  
Vi – amboso por di' kaj satano.

Vi – serĉata de l' viv' eliksir',  
viva akvo, fabel-talismano,  
paroksisma freneza delir',  
temp-maŝino de Wells'a romano.

Sub sekcanta mens-analiz'  
de progresanta scienco  
kun ĝusta skrupula preciz'  
iam klariĝos esenco.

"Is — As" = estiv'  
sekvigas "os"-energion,  
tiel socia viv'  
produktas konscion.

Al Vi, sfinkse enigma "Os",  
ĝis la scienco Vin solvos,  
kun poezia patos'  
mi florojn-poemojn disvolvos.

Sintezante en vorto-parol'  
ĝiajn fortojn de l' en' kaj ekstero,  
mi la menson risortos je Vol'  
sur la vojo al plena libero.

"Is" — "As" — "Os"  
tri elementoj de l' Tuto,  
finito, vivato, ĥaos', —  
problemo de Absoluto.

\*


## lom pri la poeto Eŭgeno Miĥalski

Karaj legantoj! Ni esperas, ke vi kun intereso tralegis versan fragmenton pri "tri elementoj de Tuto – "Is", "As", "Os" de Eŭgeno Miĥalski. Ĉi jare ni havas 110-jaran datrevenon de tiu ĉi klasikulo de nia E-literaturo. Tial ni ŝatus iom da spaco de "Komencanto" dediĉi al la poeto mem.

Eŭgeno Miĥalski estas unu el la plej elstaraj E-verkistoj de la komenco de la 20-a jarcento. Oni nomas lin "majstro de liberaj formoj", ĉar Miĥalski estas la unua E-poeto, kiu grandparte uzas liberajn versojn kontraste al kutimaj, klasikaj verso-formoj.

La vivhistorio de la poeto estas mallonga kaj tragedia. Li naskiĝis 21jan 1897 en Ukrainio. Profesie li estis instruisto kaj bibliotekisto. Esperantistiĝis E.Miĥalski junaĝe, en 1911, kaj baldaŭ ekaktivis kiel poeto kaj kiel movadano. En 1917 li fondis en Saratov (Rusio) literaturan E-revuon "Libera Torento". En ĝi aperis liaj unuaj originalaj poemoj kaj liaj tradukaĵoj. El sub lia plumo ankaŭ aperis poemaroj: "La unua ondo" (en 1918), "Du poemoj" (1922), "Prologo" (1929) kaj "Fajro kuracas" (1932). Plena kolekto de liaj verkoj kaj aldono de liaj gazetaj publikaĵoj, kolektitaj de W. Auld, estis eldonita de FEL (Flandra E-Ligo) en 1994-a jaro.

### mi estas



*Jak le Puil*

Sed lian esperantistan agadon konsistigis ne nur poezia kreado. Li kunlaboris kun SAT-organoj (Senaciacca Asocio Tutmonda), la revuoj "Internaciisto" kaj "La nova etapo". Li estis unu el fondintoj de IAREV (Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj).

Sed finiĝis la revolucio, en kiun li kredis, kaj poste sekvis poiomaj ŝanĝoj en sovetia gvidantaro. Pli poste komenciĝis "granda purigo" kaj amasa ekstremado de "dangeraĵ" iamaj portantoj de revoluciidealaj, inkluzive esperantistoj. Kaj tiam E.Miĥalskij, kiel multaj aliaj elstaraj sovetiaj esperantistoj, estis arestita kaj ekzekutita. Tiel tragike kaj tro frue finiĝis la vivo de la poeto, kiu de multaj estas konsiderata kiel unu el la plej brilaj esperantlingvaj poetoj.

Persona liriko, amo, socia filozofio, mondpolitikaj aktualaĵoj estas la temoj de liaj poemoj, kiuj estas belaj, variaj kaj lingve majstrecaj. Sin mem li rigardis unua-vice kiel kreanton, kiu celas la veron. En la poemo "Mi estas..." li skribis:

Mi estas pokalo de belpoezio,  
Mi estas martelo de ver',  
Mi estas fontano de versfantazio,  
Potenca liber'!

Mi estas modesta, sen celo je "nomo",  
Mi estas fluganta la vent',  
Mi estas de floroj flosanta aromo,  
Ribela torent'...

Mi kreas por krei.

Sen ia kromcelo.

Mi kreas poemon el kor'.

Mi kreas per ĝi monumenton  
de l' Belo


En versa kolor'.

*Vaste konata esperantisto kaj bardo*

*Jak Le Puil*

*el Francio skribis belan muzikon al la poemo "Mi estas" kaj ĝi kiel kanto jam aperis sur lia CD. Ĉi tie vi vidas bildon de la kovrilo de tiu ĉi disko.*

# Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...




*Wolf Wondratschek*

el la germana esperantigis **Arina Osipova** [Jekaterinburg, Rusio]

## 43 Historioj pri Amo

Didi volas ĉiam.  
Olga estas fama.  
Ursel jam trifoje havis fiaskon.  
Hajdi estas malkaŝema.  
Elke neniam scias ion ĝuste.  
Petra koleras.  
Barbara silentas.  
Al Andrea ĉio rapide tedas.  
Elizabet ĉion prikalkulas.  
Eva ion serĉas ĉie.  
Ute estas simple komplika.  
Gabi nenion trovas.  
Silvia opinias, ke tio estas bonege.

Sadretidinova Naila [Voroneĵ, Rusio]



*Nia samurbanino, esperantovulo **Arina Osipova** nun kuraĝe provas verki originalaĵojn kaj ankaŭ traduki. Jen estas ŝia traduko de amuza kaj ĝenre originala germana verko, kies temo estas diversaj amoj. Ĉiujn Amatinojn heroo-“kazanovo” rememoras per io aparta, karakteriza.*

(la red.)

Mariane havas paroksismojn.

Nadine parolas pri tio.  
Edite ploras pri tio.  
Hannelore ridas pri tio.  
Erika ĝojas kiel infano.  
Loni ĉiam cedas.  
Katarina bezonas ĉiam admoni.  
Ria estas ĉiam ĉi tie.  
Brigite estas vera miraklo.  
Angela volas nenion scii pri tio.  
Helga povas tion.  
Tanja timas.  
Lisa akceptas ĉion malbone.

Carola, Anke kaj Hana tute ne havas dubon.

Sabine ĉiam atendas.  
Kun Ula tio estas tiel simple.  
Ilze povas bonege kontroli sin.  
Gretel ne pensas pri tio.  
Vera ne meditas pri tio.  
Por Margot tio ne estas simple.  
Kristel scias, kion ŝi volas.  
Kamila ne povas rezigni tion.  
Gundula ĉion trograndigas.  
Nina ĉiam afektas.  
Ariane simple malkonfesas tion.

Aleksandra estas simple Aleksandra.

Vroni freneziĝas de tio.  
Claudia obeas siajn gepatrojn.  
Didi volas ĉiam...

## Ŝercaj rimarkoj pri rilatoj inter viroj kaj ...inoj

La amo estas malsano, dum kiu la malsanaj flegas la sanajn.

\*

La unua amo estas la plej feliĉa - ĝi malofte finiĝas per geedziĝo.

\*

— Kara junulo, ĉu vi povas akompani min ĝis la hejmo?

— Nur per okuloj!

\*

— Pardonu, sinjoroj, hodiaŭ mi havas la unuan en la vivo rendezuon kun junulino. Ĉu vi ne scias, kiom da tempo ĝentila viro devas atendi sian damon?

— Vera ĝentila viro devas atendi sian damon eĉ eterne!

— Kelkaj, ekzemple, atendas la tutan vivon. Kaj, interalie, estas kontentaj pri tio.

\*

— Sinjoro, mi estas tre hontema kaj... Ĉu vi povas konsili, kiel estas pli bone konatiĝi kun junulino sur la plaĝo?

— Nu, la plej bona maniero konatiĝi estas salti en akvon kaj savi junulinon, kiu dronas.

— Kaj se ŝi ne volas konatiĝi kun mi?

— Nu, tiam pardonpetu kaj naĝu reen.

\*

— Ĉu vi scias, amikoj, kiam mi vidas belan junulinon, mi forgesas pri ĉio cetera.

— Eĉ pri tio, ke vi estas edziĝinta?

— Ĉu mi estas edziĝinta?

— Tutcerte.

— Jen, karulo... Mi ja diris, ke mi pri ĉio forgesas.

\*

Feliĉa viro — estas averaĝo inter edzo kaj fraŭlo.

Virinoj kaj katoj faras kion ajn laŭ sia plaĉo. Viroj kaj hundoj malstreĉiĝu kaj kutimiĝu al tio.

\*

Panjo, kial fianĉo kaj fianĉino tenas sin man-al-mane?

— Tio estas la tradicio. Boksistoj antaŭ lukto ankaŭ premas manojn unu al la alia.

\*

Edzino al sia edzo:

Mi sentas sin terure, mi dikiĝis kaj aspektas malbele. Faru al mi komplimenton.

La edzo:

— Via vidkapablo estas preskaŭ perfekta.

\*

Novedziĝinta viro demandis sian edzinon:

— Ĉu vi edziniĝus al mi, se mia patro ne heredigus al mi riĉaĵojn?

— Kara, - dolĉe respondis la virino, - Mi egale edziniĝus al vi, ne gravas kiu ajn heredigus al vi la riĉaĵojn.

\*

Mia edzo kaj mi divorcis pro religiaj kialoj: li opinias ke li estas Dio, sed mi ne opinias tion.



— Mi aŭdis, sinjoro, ke vi ĉi jare planas edziĝi? Ĉu tio veras?

— Nu, principe, mi tion planis... Tamen printempo jam finiĝas — sed mi, ho ve!, ĝis nun ne enamiĝis.

— Kia problemo! Enamiĝu somere!

— Ne, kara, somere mi jam planis divorci.

\*

La paperaj floroj pli longe konserviĝos, se oni ne metas ilin en akvon.

\*

Rakontas amikino de la edzino.

— Hieraŭ venis al mi masaĝistino, masaĝas mian dorson kaj grumbletas, murmurante: "Tio ĉe mi estas malbone, alio malbonas...". Subite ŝi vigliĝas kaj diras: "Ho, vi havas bonan...". Nu, mi pensas. tamen ion bonan ŝi ĉe mi trovis... "Vi havas bonan skoliozon".

# Piede el Francio al Mongolio

**Betty Chatterjee** [Danio]

*Tio estas kontribuado de nia nova aŭtorino Betty Chatterjee. Ŝi debutis en "K"-4-2006 kun eseo "La "avantaĝo" paroli angle".*

*Ĉi-tiun intervjuon kun mondvojaĝanto Maxime Rabineau ŝi sukcesis fari dum lia gastado en ŝia hejmo.*

**M**axime Rabineau estas dudek du jaraĝa bakisto kaj esperantisto de Francio, kiu estas survoje al Mongolio. Mi imagas, ke vi nun pensas: kio do, tiom da homoj nuntempe trajne aŭ aviadile vojaĝas al Mongolio! Tamen, li nek trajnas nek aviadilas. Li piede vojaĝas! La 22-an de aprilo 2006 li piede ekiris de Francio kune kun sia amiko Arnaud kaj ilia azeno Filuche! Ili vojaĝis de Orleans tra Francio, Svisio kaj Germanio. Decembre ili atingis Hamburgon, kaj de tie Arnaud kaj Filuche ekiris hejmen, tial ili nun estas ie survoje al Francio.

Ekde tiam Maxime jam sole daŭrigas la vagadon. Ĝis nun li jam piediris 4000 kilometrojn kaj jam erodis la unuajn botojn. Tage li trairas proksimume 25 kilometrojn, kaj nokte eble plej ofte li tranoktas ĉe esperantistoj. Somere, se mankas al li la esperantista gastigemeco, li dormas en sia tendo. Vintre li kuraĝe demandas ĉe la fremduloj pri ebleco tranokti en iu ajn ŝirmejo: ĉambro, remizo aŭ garbejo ktp.

Maxime restis ĉe mi nur unu nokton, kaj post la vespermanĝo ni longe babilis. Verŝajne mi estis tro demandema, sed Maxime pacience kaj ĝentile respondis al mi pri la jenaj demandoj:



Bulatov Ivan [Lesnoj, Rusio]

## Kial vi preferus piediri tra la mondo?

— Ĉar ne plaĉas al mi la rapideco. Mi persone bezonas sufiĉan tempon por la cerbumado pri la novaj spertoj. Cetere mi opinias, ke oni devus prizorgi la naturon per la praktikado de la verda turismo.

## Kial vi elektis Mongolion?

— Ĉar mi kredas, ke tie mi povos plu lerni pri la respondeca prizorgo de la naturo. Mi ne volus nur observi la mongolian kamparulan vivmanieron, mi volus kaj partopreni la ĉiutagan vivon de la mongoloj.

## Kiom longe vi intencos vojaĝi?

— Antaŭ la vojaĝo laborante dum 2 jaroj mi sufiĉe ŝparis la monon, por ke mi modeste vivu dum 5 jaroj. Tial mi planas vojaĝi la venontajn 4 jarojn. "Tamen mi vidu..."

## Ĉu vi neniam timas la eventualajn problemojn kaj la danĝerojn?

— Ĝis nun mi nur spertis la homan bonkorecon kaj gastamecon. Krom malvarmumo, pluraj fliktenoj kaj dentodoloro mi praktike ne malsanis dum la vojaĝo. Filuche estante azeno estis obstina, tial Arnaud kaj mi intertempe ĉagrenetis pri ĝi, sed kion fari, tio ja estas naturo de azenoj kaj ĝi estas vere portema! Mi preferus nomi problemojn defioj. Unu el ili estas tiu, ke mi ricevos nur trimonatan rusan vizon, sed neniu povus tra-piediri Rusion dum tri monatoj. Sed ne gravos, mi do biciklos tra Rusio al la Mongolia ŝtatlimo.



**Ĉu vi iam intencos verki libron pri via neordinara vojaĝo?**

— Ĉiutage mi enskribas la impresojn en la taglibron kaj mi fotas ĉiujn gastigantojn, sed mi ne estas eldonema.

**Kion vi planos fari, kiam vi hejmen revenos?**

— Post la reveno al Francio mi volus loĝi en bieneto ie en la kamparo; tie mi ŝatas havi propran bakejon. Tamen, mi vidos – post kvin jaroj eble io iomete ŝanĝigos, tial mi eble agos aliel. Momente mi nur volis ĝui la nuntempon.

Maxime dum minimume unu jaro vagados norden tra Svedio al Laponio. Dum la restado tie, li planas lerni la svedan, tiel li jam lernis la germanan dum la kvarmonata restado en Germanio. Poste li daŭrigos la vojaĝon tra Finnlando kaj Rusio. Sendube ĉie li klopodos lerni la lingvojn de la homoj, ĉe kiuj li gastos.

Maxime estas fidema, komunikema kaj tolerema, tial li certe ĉie trovis, trovas kaj trovos la geamikojn. Por mi la renkontiĝo kun li estis ankoraŭ unu ekzemplo pri la valoro de Esperanto. Okaze de la semajno de Internacia Amikeco, mi tutkore esperas, ke vi iam renkontiĝu kun li.

*Se vi deziras sekvi la vojaĝon de Maxime, jen estas la ligo:*  
<http://tra-la-mondo.blogspot.com>

## Konkurso “Enigmoj – 2006”

Karaj enigmoŝatantoj!

Jen estas korektaj respondoj de la enigmo “Ĉirkaŭ domvorto” el “K”-6-2006.

**Horizontale:**

C/ Dom' — C/ Loĝej' — D/ Fundament — E/ Kel' — G/ Mur' — H/ Pinjon' — H/ Bal-kon' — Ĥ/ Tegol' — I/ Fasad' — Ĵ/ Subtegment' — L/ Pord' — L/ Teretaĝ'

**Vertikale:**

3/ Kamen' — 3/ Ŝutr' — 5/ Defluilo — 7/ Mansard' — 9/ Ŝtupar' — 9/ Bazament' — 11/ Hejm' — 13/ Tegment' — 14/ Etaĝ' — 15/ Fenestr' — 16/ Sojl' — 17/ Kovril'

Venis tempo resumi la ĝeneralajn rezultojn de nia konkurso “Enigmo-2006”. Jen estas niaj gajnintoj:

- |  |     |              |
|--|-----|--------------|
| 1) Anton Loŝmanov [Komsomolsk-na-Amure, Rusio] | >>> | 65 + 20 = 85 |
| 2) Christian Riviere [Le Mans, Francio]        | >>> | 47 + 20 = 67 |
| 3) Jackie Huberdeau [Le Mans, Francio]         | >>> | = 10         |

Do, karaj amikoj!

La 1-an premion – abonon al “Komencanto” – 2007 gajnis

**Loŝmanov Anton** (Rusio)

La 2-an premion – libron de poemoj de fama E-poeto Nikolaj Hoĥlov gajnis

**Christian Riviere** el (Francio)

La 3-an premion – honoran diplomon gajnis

**Jackie Huberdeau** (Francio)

Niaj gratuloj al ĉiuj premiitoj!

Sanon, feliĉon, sukcesojn deziras al vi redakcio de “Komencanto” !!!


Ĉi-sube startas enigma konkurso “Enigmo”-2007

## Konkurso “Enigmoj-2007” 15 poentoj

**Viktor Alikin** [Permo, Rusio]

Bonvolu enskribi vortojn laŭ hormontrila direkto, komencante de tiu sesangulo, kiu estas indikita per montrilo

- Ĉefurbo de Ĉinio.
- Portugala mon-unuo.
- Glaciiga malvarmo.
- Nerealigebla projekto.
- Signo de Zodiako.
- Papa ambasadoro.
- Cemento miksitita kun ŝtonetoj kaj sablo.
- Kemia elemento Nb.
- Konstruaĵo en kiu oni prezentas spektakloj.
- Rabobesto kun altvalora silkeca grizbruna felo.
- Angulmezurilo.
- Alta fortika pecego el ŝtono, betono, ligno, metalo.
- Citrono.
- Koloro de haroj.
- Flava metacio.
- Ano de junulara movado.
- Diablo.
- Inerta gaso.
- Detrua pluvo-ventego.
- Mangajo el kuiritaj ovoj.



# Bonvenon al Japanio!!!

vigle kun mantakto

muziko kaj versoj Tazima Mayuko (kun helpo de Kitagawa Hisasi)

Se vi ŝa-tas vo-ja-ĝon, se vi ŝa-tas hom-a-mon,  
 Se vi ŝa-tas bongu-sta-ĝojn, ve-nu al Ja-pa-ni-o!  
 Se vi vo-las a-mi-ke-con, se vi vo-las tra-vi-vi.  
 Tre mi-rin-dajn e-pi-zo-dajn, ve-hu al Jo-ko-ha-mo! Vi-  
 din-daj lo-koj, ja-pa-naj kul-tu-roj a-  
 ten-das vin ĉi-ujn en Ja-pa-ni-o. Bon-vo-le!

1 Bon-ve-non.      Bon-ve-non.      (ek!) al Ja-pa-ni-o!  
 2 Jo-ko-ha-mo.      Jo-ko-ha-mo.      (ek!) bon-ve-ni-ĝos vin!  
 3 Ni-iru.              Ni-iru.              (ek!) al Ja-pa-ni-o!

1 Bon-ve-non.      Bon-ve-non al Ja-pa-ni-o!  
 2 Jo-ko-ha-mo.      Jo-ko-ha-mo. (Jes!) Ni a-ten-das vin!  
 3 Ni-iru.              Ni-iru al Ja-pa-ni-o! (Bonvenon!!!)

Se vi ŝatas vojaĝon, se vi ŝatas homamon,  
 Se vi ŝatas bongustaĵojn, venu al Japanio!  
 Se vi volas amikecon, se vi volas travivi  
 Tre mirindajn epizodojn, venu al Jokohamo!  
 Vidindaj lokoj, japanaj kulturoj  
 Atendas vin ĉiujn en Japanio!  
 Bonvole!

Bonvenon, bonvenon (ek!) al Japanio!  
 Bonvenon, bonvenon (ek!) al Japanio!  
 Jokohamo, Jokohamo (ek!) bonvenigos vin!  
 Jokohamo, Jokohamo! (Jes!) Ni atendas vin!  
 Ni iru, ni iru (ek!) al Japanio!!!  
 Ni iru, ni iru al Japanio!!!

**komencanto@r66.ru**

vijaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

